

# Memprezento

Christer Kiselman

## 1. Akademia komenco

André Albault skribis 1988-07-19 en letero al mi: “En 1989 okazos la novaj elektoj por eniro en la Akademion de novaj homoj. Ni diskutis en la Estraro pri diversaj nomoj; vi estas inter ili.” Mi kandidatiĝis kaj estis elektita; poste reelektita en 1998 kaj 2007. Dum la periodo 1998-07-02—2005-01-03 mi estis la unua vicprezidanto. En la akademio mi estas nun direktoro de la Sekcio pri Faka lingvo kaj membro en la Sekcioj pri Gramatiko, pri la Ĝenerala vortaro kaj pri Prononco.

Renato Corsetti demandis en letero de 2013-05-05 ĉu mi “pretus transpreni la rolon de prezidanto de la Akademio”. Post semajnlonga cerbumado kaj hezito mi akceptis kandidatiĝi.

Ĉar la membroj nepre sciu por kiu aŭ kontraŭ kiu ili voĉdonos, mi prezentas min ĉi tie; en mallongigita formo ĝi estos dissendita fare de Renato, sed la nuna pli longa versio ne — ĝi tamen estos disponebla.

## 2. La vera komenco

Mi naskiĝis 1939-04-08 13:03 en Stokholmo, Svedio. Mia patro, Sam Svensson<sup>1</sup> (1896–1966), kiu estis velŝipmaristo, ŝipestro kaj dungito en la Marhistoria muzeo de la ŝtato, kaj mia patrino, Elsa Svensson (1904–1990; antaŭ edziniĝo Aspelin), alparolis min en la sveda lingvo, ne demandinte min kiun lingvon mi preferus.

## 3. Lingvokonoj

Miaj ĉiutagaj lingvoj, parole kaj skribe, estas la sveda, esperanto, la angla kaj la franca.

En la lernejo mi studis la anglan, la germanan kaj la francan. Mia plej inspira instruisto en ĉiuj kategorioj estis mia instruisto pri la germana, Karl Axnäs (1899–1984), doktoro pri slavaj lingvoj. Li gvidis kurson en la nacia svedia radio

---

<sup>1</sup>Ĉar iu demandis, mi menciis ke mia familia nomo estis Svensson ĝis 1962-08-06 10:50. Tiam mia edzino kaj mi ŝanĝis al Kiselman. La multaj svedaj nomoj finiĝantaj per *son* ‘filo’ kaj *dotter* ‘filino’ estis origine ne familiaj nomoj sed patronimoj. Nur en la deknaŭa jarcento ili fariĝis familiaj nomoj. Multaj ŝanĝas al pli distinga nomo. Sufiĉas gugli Svensson kaj Kiselman por kompreni la motivon.

pri la rusa lingvo, kiun mi sekvis kiel 13-jarulo. Pro li mi havas mian longtempan intereson pri lingvoj, ĉar li parolis ne nur pri la germana sed pri multaj lingvaj aferoj, ekzemple pri etimologio. Dum iu tempo lin anstataŭis Henrik Birnbaum (1925–2002), kiu forte impresis min spite al la mallonga instrutempo, kaj kiu poste fariĝis mondfama slavisto. Li estis profesoro ĉe UCLA 1964–1994. Mi poste studis la rusan<sup>2</sup> en la Stokholma altlernejo, tamen ne akirante iun diplomon.

Mia unua diplomo, responda al 180 ECTS-poentoj, temis pri matematiko, astronomio kaj teoria filozofio. Mi akiris ĝin post dekmonata<sup>3</sup> studado en la Stokholma altlernejo. Mi poste kompletigis ĝin per pli da matematiko kaj meteo(ro)logio.

Mi iomete studis ankaŭ la ĉinan. Lastatempe mi studis plurajn kursojn de la persa,<sup>4</sup> de la klasika greka kaj aliajn kursojn: *La lingvoj kaj la literaturo de Meza Oriento kaj de Centra kaj Suda Azio*; *La religioj, la historio kaj la literaturo de Sudazio*; *La invento, evoluigo kaj uzo de skribo*; kaj *Fruaj lingvoj*.<sup>5</sup>

Tre grava por mia kultura edukado estas la fakto ke mi vivis po unu jaron en Usono (Princeton, NJ) kaj Francio (Nico, Alpes-Maritimes) kiel esploristo respektive gastprofesoro, kaj poste ofte revenis al Francio, tiel ke mi pasigis entute pli ol du jarojn en tiu lando. Tie mi havas miajn plej bonajn kontaktojn pri matematiko; mi ricevis honoran doktorecon en Tuluzo kaj estis nomumita oficiro en la ordeno *Ordre National du Mérite* fare de la respublika prezidanto Jacques Chirac.

Mi komencis studi esperanton en lernolibroj pro inspiro en majo 1980 de Jarlo Martelmonto (Jarl Hammarberg), mia tiama bofrato, kaj plej multe lernis dum interparolado en la upsala Esperanto-Societo, kiu en la okdekaj jaroj havis plurajn tre viglajn parolantojn de la lingvo, inter ili Guy Coste, Tomas Jansson, Sven Jonsson, Ingrid Maier (nun membro de la redakta komitato de EES) kaj Leif Nordenstorm (aŭtoro de historia artikolo en EES 6).

Mi instruis esperanton je gimnazia nivelo dum la aŭtuno de 1999 kaj la printempo de 2000 en Katedralskolan, Upsalo; Sven Jonsson instruis alian grupon en la sama gimnazio.

## 4. Matematiko

Kiel matematikisto mi unue laboris pri partaj diferencialaj ekvacioj, poste dum multaj jaroj pri kompleksa analitiko en pluraj variabloj kaj pri kompleksa geometrio, ankaŭ en nefiniaj dimensioj. Nuntempe mi plej esploras pri digita geometrio, matematika morfologio kaj diskreta optimumado.

<sup>2</sup>En tiu tempo la rusa estis grava lingvo en la matematiko.

<sup>3</sup>Tio eblis, ĉar mi jam en la gimnazio estis studinta astronomion, kaj ĉar en tiu tempo oni ne havis multajn instruhorojn kiuj ĝenis la lernadon.

<sup>4</sup>Lige al tiuj kursoj pri la persa mi faris studon 64-paĝan, havigeblan el mia retejo, pri la historio de la nocio de fonemo kaj trarigardis la vokalfonemojn en la sveda, en aŭstralaj lingvoj, en la araba, esperanto, la rusa, pola, japana kaj persa. Laŭ Sture Allén, iama sekretario de la Sveda Akademio, mi nepre publikigu ĝin, sed mi ankoraŭ ne faris.

<sup>5</sup>Lige al la du laste menciitaj kursoj mi verkis plurajn eseojn, i.a. unu pri la verboj en la malnovtamula lingvo (ampleksantan 15 paĝojn; ĝi ne estas havigebla ĉe la retejo).

Por miaj matematikaj publikigaĵoj rigardu *MathSciNet*, en kiu estas listigitaj 55 publikigaĵoj miaj kaj 6 aliaj eroj rilataj al mi.

Mi gvidis deksep personojn al doktoreco, el kiuj po unu el Egipto, Sudano, Ĉinio, Pollando kaj Irano: vidu la *Mathematics Genealogy Project*. Momente mi estas konsilanto de unu doktoriĝanto, Adama Arouna Koné el Malio.

Mi membras en tri svediaj sciencaj akademioj kaj en unu pollanda (en Krakovo).

## 5. Komisioj pri gvidado

Ĉar la prezidanto de akademio iel kaj iom gvidas ties laboron, mi menciuj ke mi akceptis plurajn komisiojn de gvidado, el kiu mi iom lernis kunlaborigi homojn kaj trakti konfliktojn. (Mi malakceptis kelkajn komisiojn.)

Mi estis direktoro (prefekto) de la Matematika instituto ĉe la Upsala universitato dum 5 jaroj, dekanano dum 4 jaroj, prezidanto de pluraj komitatoj, ekzemple de la Svedia nacia komitato por matematiko<sup>6</sup> dum 8 jaroj, de la estraro de la Instituto Mittag-Leffler (nordia matematika esplorinstituto) dum 6 jaroj, de fakultata komitato por egaleco inter virinoj kaj viroj dum 2 jaroj kaj de fakultata komitato por informado dum pli ol 5 jaroj. Detaloj aperas en mia CV en esperanto, la angla kaj la franca.

## 6. Esperanto-kongresoj

Mi partoprenis en dudek kvar Universalaj Kongresoj de Esperanto: en 1980 (tamen tiam nur dum unu tago), kaj plene en tiuj de 1987, 1989, 1991, 1992 kaj 1994–2012. Entute mi vizitis proksimume 54 landojn kaj vivis pli ol jaron en tri.

Dum la kongresoj en 2009 kaj 2010 mi organizis la jaran Esperantologian konferencon, en 2012 kune kun Mélanie Maradan.

Dum tri jaroj mi estis la sekretario de la Internacia kongresa universitato (IKU): Vilno 2005, Florenco 2006, Jokohamo 2007. Dufoje mi servis kiel la rektoro de IKU: Gotenburgo 2003 kaj Kopenhago 2011.

Mi kvarfoje partoprenis en la simpozioj en Karlovo organizitaj de Boĵidar Leonov kaj nomataj *Apliko de Esperanto en Profesia Agado*, AEPA. La jaroj kaj titoloj estis: 2009: *Diskreta kaj reela optimumado* (publikigita 2012);

2010: *Kiel rekoni rektajn kaj strekojn inter ĉiuj kurboj kaj aliaj bildoj sur la komputila ekrano?*;

2012: *Kiel plej bone faldi triangulon?*; kaj

2013: *La rektaj de Eŭklido*.

---

<sup>6</sup>Tiu komitato, nomumita de la Reĝa sveda akademio de sciencoj, estas landa membro de la Internacia matematika unio, kiu organizas ĉiun kvaran jaron grandegan kongreson kaj antaŭ ĝi ĝeneralan asembleon; mi gvidis la svedian delegacion al la ĝeneralaj asembleoj en Dreseno 1998 kaj Ŝanhajo 2002.

## 7. Familio

Mi estis edzo dum la jaroj 1961–1987 kaj havas kun mia edzino tri infanojn (naskitajn en 1963–1969), kaj nun ses genepojn (naskitajn en 1997–2009).

Post interkonsentita divorco en 1987 mi vivis kun mia pli juna filo. Dum la periodo 1989–2009 mi estis sinsekve kunulo de du virinoj. Dum tiuj preskaŭ dudek jaroj ni parolis inter ni nur esperanton. Pro tio mi konas la lingvon en ĉiutagaj kaj intimaj situacioj.

## 8. Naciismo

Laŭ mi unu el la plej gravaj eldiroj de Zamenhof estas:

Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj — kiel natura sindefenda reago — estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed, se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute neŭtrala. (Respondo de 1914-06-30 al invito partopreni fondon de Hebrea Ligo en Parizo; ĉi tie citita laŭ Zamenhof 1983:344–345)

Mi esperas ke la laboro de la akademio ĉiam laŭos tiun lian konvinkon.

### Referenco

Zamenhof, L. L. 1983. *Originala verkaro. Antaŭparoloj — Gazetartikoloj — Traktaĵoj — Paroladoj — Leteroj — Poemoj*. Kolektitaj kaj ordigitaj de Joh[annes] Dietterle. Osaka: Oriental-Libro. (Fotorepreso de la eldono publikigita 1929 de Ferdinand Hirt & Sohn en Lepsiko.)

## 9. Pensoj pri la Akademio de Esperanto

Mi estis reelektita kiel membro 2007-04-18 per 34 voĉoj. Du kandidatoj ricevis 33 voĉojn, la aliaj malpli. Mi interpretas tion kiel indikon ke mi ne kolerigis multajn membrojn. Fakte, kiel mi diris al Renato dum telefona interparolo, “Ich bin der Mann ohne Eigenschaften” — Mi estas la viro sen ecoj. Tamen tio ne estas sufiĉa merito. Mi malkaŝos kelkajn el miaj pensoj ĉi tie, por ke vi vidu ke mi havas almenaŭ iujn ecojn (kaŝitajn aŭ ne).


### 9.1. Priskribo de la lingvo esperanto

Ĉiu lingvo povas esti priskribita plurmaniere. Ne estas kontraŭdiro ke esperanto havas plurajn priskribojn. Sed mi opinias ke la priskribo de la lingvo fare de la akademio ĝene postrestas kompare al la lingvoscienco ĝenerale kaj la filologio aplikata al aliaj lingvoj. Mi volas ĉi tie mencii la verkojn de Szerdahelyi István, ekzemple lian artikolon (1976) kaj la interŝanĝon de opinioj inter li kaj Gaston Waringhien pri kiu rakontas Giorgio Silfer (2009).

Tamen ni nepre substreku: Zamenhof enkondukis en la novan lingvon ne vortelementon sed vorton. Vortelementon li ne povis transpreni el la fontolingvo: li povis transpreni nur plenan, memstaran vorton. La ekstrakto de la radikmorfemo el la vorto estis jam dua operacio. La unua operacio: la transpreno de la vorto el la fontolingvo okazis inter la du sistemoj — inter la fonto kaj la nova konstruiĝanta sistemo. La dua operacio: la ekstrakto de la radiko el la vorto okazis jam interne de la nova sistemo. (Szerdahelyi 1976:8)


Alia, pli nova priskribo de esperantaj radikoj kaj vortoj estis publikigita de Wim Jansen (2013) uzante la konceptojn kaj terminojn de la funkcia diskurs-gramatiko.

Por mencii nur unu detalon el lia artikolo mi unue reproduktas lian figuron pri la vortstrukturo laŭ PAG.



Figuro 1. La esperanta vortstrukturo laŭ PAG (Jansen 2013:18)

Poste mi reproduktas lian vortstrukturon.



Figuro 2. La esperanta vortstrukturo en fleksebla parolparta sistemo (Jansen 2013:36)

Se oni legas nur la lastajn liniojn en la du figuroj, ne ŝajnas esti granda diferenco inter ili: kategoria radiko kun nepra radiksignifo ŝajnas esti tre proksima al senkategoria radiko kun nepra radiksignifo. Estas por mi malfacile kompreni kial la diferencoj iam kaŭzis tiom da lukto. Mi mem antaŭ dudek du jaroj provis klarigi la ekvivalenton kiam temas pri informo inter la ideo de kategorieco de la radikoj kaj la ideo de primitiva aŭ primara vorto (91-a:107).

Kiam temas pri aliaj lingvoj oni kutime esploras la lingvon (la parolaktojn, *la parole*, kaj la komunan, socian konon de la lingva sistemo, *la langue*, por citi Ferdinand de Saussure), analizas ĝin el fonetika, fonologia, sintaksa vidpunktoj k.t.p., kaj klopodas sisteme ordigi la analizojn. Malplimulto de la lingvoj posedas skriban sistemon, kiu estas kvazaŭ reflektado de la lingvo en pli-malpli makulita spegulo. Por esperanto la skribo estis, kiel ni ĉiuj scias, dekomence tre grava; tiu fakto tamen ne malhelpus ĝian traktadon samrange al ĉiu alia lingvo de la planedo.

Tiaj studoj ja estas faritaj ankaŭ por esperanto, sed pli ofta sinteno estas esplori ĉion el la vidpunkto de la Fundamento. Mi memorigas pri tio ke la tasko de la akademio “estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon”. Konservi kaj protekti la fundamentajn principojn oni povas bone fari, samtempe ne konsiderante kontraŭ-Fundamenta ĉion kio ne estas eksplice menciita en la Fundamento.

Esperanto estas unika fenomeno lingva kaj socia, kaj ni strebu al ekvilibro inter protekto de ties fundamentaj principoj kaj respekto al la nuna, vivanta kaj observinda lingvo.<sup>7</sup> Ni ne forgesu la vortojn de Zamenhof en Antverpeno 1911 pri Volapuko:

Volapük pereis ĉefe pro unu grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde<sup>8</sup> enhavis: absoluta manko de natura evoluipovo; kun ĉiu nova vorto aŭ formo la lingvo devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malpaconta personaro.<sup>9</sup> Kiel sur bastono plantita en teron, novaj branĉoj kaj folioj ne povis nature kreski sur ĝi, sed devis esti konstante skulptataj kaj algluataj. (Zamenhof 1983:404)

Rigardo al esperanto kiel al ĉiu alia lingvo, do observi la fakte ekzistantan lingvon, povus doni freŝon al la akademio, kaj cetere altigi ties renomon inter profesiaj lingvistoj. Lingvisto kiu analizas kaj priskribas la sufiksojn de la malnovtamula — kiu cetere estas precipe aglutina lingvo — ne riskas ricevi kritikon, ĉar temas pri tute kutima esplormetodo. Sed se iu faras la samon pri esperanto, aperas akra kritiko, eĉ tre emocia.<sup>10</sup>

---

<sup>7</sup>Mi ne povas ne pensi pri la konfliktoj inter teologoj kaj natursciencistoj en Upsalo dum la dekoka jarcento. Kie trovi la veron: ĉu en la naturo, ĉu en la sanktaj skribaĵoj? Unu el la elstaraj pledantoj por empiriaj studoj de la naturo estis Nils Celsius (Celsius, 1658–1724, patro de Anders Celsius, 1701–1744, konata pro sia termometra skalo.)

<sup>8</sup>Kial bedaŭrinde?

<sup>9</sup>Li ĉi tie ne celas la nunan Akademion de Esperanto.

<sup>10</sup>Tiu fenomeno memorigas min pri la malpermeso dissekci homajn korpojn, kiu ekzistis aŭ ekzistas iam kaj ie. La klarigo estus ke la homon faris Dio, kaj ne decas por homo enrigardi en faritaĵon de Dio.

Mi memorigas pri la verkoj de István Szerdahelyi (1979:114) kaj Humphrey Tonkin (2001) kie ili mencias du specojn de esperantologio. Ni certe bezonas kaj endogenan kaj ekzogenan esperantologion, sed iom pli forta dozo de la ekzogena ene de AdE ne estus malbone.

Mi menciuj ke la Sveda Akademio publikigis kvarvoluman gramatikon pri la sveda lingvo (Teleman k.a. 1999), kiu estas principe priskriba kaj ampleksas 2 745 paĝojn, kaj preskriban gramatikon (Hultman 2003) ampleksantan 358 paĝojn. Ĉu alstrebinda celo por ni?

La distingo inter priskriba kaj preskriba (normiga) gramatiko estas grava, sed ankaŭ malfacila. Eĉ la plej priskriba verko, kiel la sveda gramatiko ĵus menciita, nepre enhavas elementon de normigo. Kaj la plej normiga verko nepre atentu la lingvouzon, do enhavu elementon de priskribo. Temas pri gradoj sur skalo. Plej notinde estas ke priskriba verko povos fariĝi normiga: Pāṇini, la plej elstara gramatikisto de ĉiuj tempoj (ĝis nun), verkis detalan kaj tamen tre koncizan gramatikon de sanskrito. Kutime oni nomas ĝin priskriba. Sed ĉar ĝi estis bonega kaj tre konata, ĝi fariĝis — eble kontraŭ la intencoj de la aŭtoro — normiga: ĉiuj postaj tekstoj de sanskrito sekvis, aŭ klopodis sekvi, ĝin (Jamison 2008:6). Mallonge dirite: Pāṇini difinis sanskriton. Similan sorton povus havi verko de AdE.

Notinde estas ke ĉiuj aŭtoroj de la du svedaj verkoj estis ne-membroj de la Sveda Akademio: la akademio komisiis al ili verki, kaj lingva komitato de la akademio, konsistanta en la okazo de la granda gramatiko el tri membroj kaj unu sekretario (ne-membro), gvidis la laboron kaj kunlaboris kun la aŭtoroj sed ne mem verkis. Tio nepre starigas la demandon ĉu la Akademio de Esperanto povus kunlabori kun ne-membroj, specialistoj de la lingvo kiuj ial ne estas membroj, kaj ricevi helpon de ili.

Werner Bormann (1999:40) atentigis pri la fakto ke en komisionoj akademianoj povas kunlabori kun ne-membroj (Statuto, artikolo 17). Sed komisionoj “plenumas aliajn taskojn ol la lingvaj”. Prilingva kunlaboro devas do esti neoficiala — sen statutŝanĝo, kiu ja supozigas pezan proceduron kun necerta rezulto.

## Referencoj

- Bormann, Werner. 1999. Novaj defioj antaŭ la Akademio de Esperanto. **En:** Blanke, D[etlev]; McCoy, R[oy]; Buller, O[smo] (red.), *Por aktiva lingvopolitiko. Aktoj de la Lingvopolitika Seminario en la 81-a Universala Kongreso de Esperanto, Prago 1996*, pp. 35–42. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- Hultman, Tor G. 2003. *Svenska Akademiens språklära [La lingvolernolibro de la Sveda Akademio]*. Stokholmo: Svenska Akademien.
- Jamison, Stephanie W. 2008. Sanskrit. **En:** Woodard, Roger D. (red., 2008). *The Ancient Languages of Asia and the Americas*, pp. 6–32. Kembriĝo: Cambridge University Press.
- Jansen, Wim. 2013. Radikoj kaj vortoj en esperanto. *Esperantologio / Esperanto Studies* **6**, 9–43.
- Silfer, Giorgio. 2001. La lingvistika redaktoro de *Literatura Foiro*. **En:** Koutny, Ilona (red.), *Abunda fonto. Memorlibro omaĝe al Prof. István Szerdahelyi*, pp. 30–35. Poznań: ProDruk & Steleto.
- Szerdahelyi, István. 1976. *Vorto kaj vortelemento en esperanto*. Studoj 10. Kuopio: Kultura Centro Esperantista 10; Librofako de Literatura Foiro.

- Szerdahelyi, István. 1979. Pri la lingvistika priskribo de Esperanto. **En:** Blanke, Detlev (red.), *La Internacia Lingvo. Sciencaj aspektoj*, pp. 111–116. Berlino: Kulturligo de GDR; Centra Laborrondo Esperanto.
- Teleman, Ulf; Hellberg, Staffan; Andersson, Erik. 1999. *Svenska Akademiens grammatik [La grammatiko de la Sveda Akademio]*. Stokholmo: Svenska Akademien.
- Tonkin, Humphrey. 2001. Esperantologio eksogena kaj endogena. **En:** Fiedler, Sabine; Liu Haitao (red.), *Studoj pri interlingvistiko. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Studien zur Interlinguistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag*, pp. 307–325. Dobřichovice (Prago): Kava-Pech, 2001. ISBN 80-85853-53-1.
- Zamenhof, L. L. 1983. Vidu en sekcio 8.

## 9.2. Terminologio

Esploro pri la faka lingvo estas alia branĉo de la lingvoscienco pri kiu la akademio postrestas: ekzistas malforta konscio en kaj ekster la akademio pri la postuloj de terminologia laboro kaj pri la neceso evoluigi la terminologiajn aspektojn de esperanto (kaj praktike kaj teorie).

Mi mem iom konas la terminologion, sed ne sufiĉe. Kiam Lars Mouwitz kaj mi verkis la terminaron 08-b, ni partoprenis en pluraj renkontiĝoj ĉe la Nacia terminologia centro de Svedio. Estis kvazaŭ kurso instruata de elstaraj terminologoj. La lernitaĵoj el tiuj renkontiĝoj estis ege utilaj dum la organizado de la terminaro kaj la ellaborado de ties difinoj. Jam antaŭe mi estis laborinta pri la revizio de PIV, kunlabore kun H. S. Holdgrün pri matematiko kaj kun Ingemar Kaj pri statistiko.

Ekzistas libreto kun terminologiaj gvidlinioj pri terminologiaj politikoj, eldonita de Unesko (2012). Koncede ĝi estas iom abstrakta kaj rilatas ĉefe al lingvoj prizorgataj de iu ŝtato. Mélanie Maradan kaj Johannes Mueller (2012) starigas demandon pri la ebloj uzi esperanton en faka komunikado. La libro de Wera Blanke (2013) estas pensinstiga. La terminologian laboron ĉe ISAE skizas Maradan (2012). Ĉio povus helpi la konsiderojn de AdE.

Tamen la amplekso de terminologiaj taskoj superas la fortojn de AdE. Por mencii nur kelkajn ciferojn mi citas el artikolo de Galinski & Reineke (2011:11). La *Chemical Abstracts Service* (CAS, Servo de kemiaj resumoj) enskribis ĝis septembro 2009 kvindek milionojn da registritaj organikaj kaj neorganikaj substancoj, kaj alvenis en majo 2011 al la sesdekmilionan substancon. Ankaŭ kiam temas pri medicinaj fakvortoj la amplekso estas granda: ekzistas 80 000 nomoj por medikamentoj; 10 000 nomoj por korpopartoj, organoj kaj organpartoj; 20 000 nomoj por indiki organfunkciojn; kaj 60 000 nomoj por malsanoj, esplorprocedoj kaj operacimethodoj. La medicina vortprovizo kun konsidero de gravaj nocioj en la limkampoj ampleksas laŭ la aŭtoroj duonan milionon.

## Referencoj

- Blanke, Wera. 2013. *Pri terminologia laboro en Esperanto. Elektitaj publikaĵoj*. (Red. Blanke, Detlev). Nov-Jorko: Mondial. 316 pp.
- Galinski, Christian; Reineke, Detlef. 2011. Vor uns die Terminologieflut. *eDITion* 7, n-ro 2, pp. 8–12.
- Gvidlinioj por terminologiaj politikoj. Ellaborado kaj efektivado de terminologiaj politikoj en lingvaj komunumoj, preparitaj de Infoterm.* 2012 (traduko de originalo el 2005). Parizo: Unesko.



- ix + 39 pp. Kaptebla ĉe [www.infoterm.info/publications/documents/GuidelinesforTerminologyPolicies\\_2005Final\\_eo.pdf](http://www.infoterm.info/publications/documents/GuidelinesforTerminologyPolicies_2005Final_eo.pdf) (kontrolita 2013-05-15).
- Maradan, Mélanie. 2012. Scienca Revuo kiel helpilo por esperanta terminologio. *Scienca Revuo* 1, 37–42.
- Maradan, Mélanie; Mueller, Johannes. 2012. Esperanto — auch für die Fachkommunikation?. *MDÜ, Fachzeitschrift für Dolmetscher und Übersetzer*, 5, 46–50.

### 9.3. Konferencoj

Kiel vicprezidanto mi organizis internacian simpozion en Zagrebo 2001-07-28—30. La oficialaj lingvoj tiam anoncitaj estis esperanto, la angla, la franca kaj la kroata.<sup>11</sup> La lasta necesis, ĉar la Kroata Akademio de Sciencoj kaj Artoj (*Hrvatska Akademija Znanosti i Umjetnosti*) senpage disponigis al ni sian belan Ilirian Salonegon. Sed ne ĉiuj aprecis la decidon allasi alian lingvon ol esperanton en aranĝon de la akademio. Rimarkiginde estas ke la aranĝo estis komuna de la du akademioj.

Mi organizis en Gotenburgo simpozion pri interkultura komunikado 2003-08-02—03. Okazis prezentoj en esperanto kaj la angla, kaj mi tiam ne aŭdis iujn protestojn kontraŭ tiu dulingveco. Temis pri kunlaboro inter nia akademio kaj la Gotenburga universitato.

La Sveda Akademio, la plej alta protektanto de la sveda lingvo, malavare finance subtenis la renkontiĝon en Gotenburgo. Preparante la zagreban renkontiĝon mi petis monon el pluraj fontoj, sen sukceso. Por la manĝaĵo tie pagis mi.

### 9.4. Jura sidejo

Antaŭ pluraj jaroj la ĝenerala sekretario klopodis aranĝi por la akademio juran personecon en iu loko, do juran sidejon. Tio ne sukcesis. Mi ne scias ekzakte kial.

### 9.5. La klaŭna klubo

Kiam mi la unuan fojon sidis kiel akademiano sur la podio en Universala Kongreso — estis en Brajtono 1989 — iuj sidis en la unua vico antaŭ ni kaj ridegis malferme pro la spektaklo. Private mi kelkfoje renkontis similajn reagojn. La akademio estas konata kiel “klaŭna klubo” inter kelkaj esperantistoj. Mi nun nur notas tion.

## 10. Kaj nun, ĉu laborplano?

La pensoj kiujn mi menciis en la antaŭa sekcio ne konsistigas laborplanon. Se elektita, mi kompreneble interkonsiliĝos kun la aliaj estraranoj kaj kun ĉiuj membroj kiomgrade la ideoj povus fariĝi laborplano. Mi konscias ke eble ne ĉio povos esti realigita (ekzemple pro kontraŭstaro aŭ pro manko de homfortoj), sed mi pensas ke prezento de la ideoj tamen havos valoron antaŭ la voĉdonado.

Mi resumas la ideojn tiel:

---

<sup>11</sup>Mia propono inkludi la germanan ne estis aprobita de la Kroata Akademio. Realigis prezentoj nur en du el la kvar lingvoj: esperanto kaj la angla.

1. *Priskribo de la lingvo esperanto.* Mi volas provi prezenti pli taŭgan priskribon de esperanto, se eble kun helpo de elstaraj lingvistoj sendepende de tio, ĉu ili membras en AdE aŭ ne. La menciita artikolo de Wim Jansen povus esti elirpunkto, kvankam la funkcia diskurs-gramatiko ankoraŭ ne estas tre konata. La strukturo de la sveda gramatiko (Teleman k.a. 1999) povus esti imitinda.
2. *Terminologio.* Ĉar la terminologiaj taskoj en sia tuteco superas niajn fortojn, mi pensas ke la akademio devus zorge pripensi kion fari por esperanto. Eblas certe fari ion, sed ni devas antaŭe decidi kio plej gravas. Kunlaboro kun UEA povus esti bona vojo: la akademio povas profiti de specialistoj lige al UEA.  
Almenaŭ la sinteno al terminologia laboro nepre estu pli pozitiva ol ĝis nun kaj la respekto al la taskoj kreskanta.
3. *Konferencoj.* Demando estas ĉu la akademio volos organizi renkontiĝojn en la estonteco similaĵn al tiuj de Prago 1994, Zagrebo 2001 kaj Gotenburgo 2003. La unua estis sen tempa rilato al iu UK; la du aliaj tuj sekvis kongreson.
4. *Jura sidejo.* Mi volus demandi pri la avantaĝoj kaj malavantaĝoj havi juran sidejon. Se la avantaĝoj estas pli grandaj ol la malavantaĝoj, venonta paŝo estos esplori kiel ni povos realigi tion. Se male, la malavantaĝoj superas la avantaĝojn, ni faru nenion.
5. *La klaŭna klubo.* Ĉu oni povos ion fari por plibonigi la renomon de AdE estas bona demando. Sed ni ĉiuj estu konsciaj pri ties reputacio.

## 11. La plej sekura laborplano

La plej sekura laborplano estas tiu priskribita de Raymond Schwartz (1894–1973) en la poemo *Vivu do l' Akademi'*:

Certe ke l' Akademi'  
estas kompetenta,  
kaj neniam ĝi eraras,  
kiam ĝi nenion faras,  
tio estas evidenta!

Sed, tamen, tamen, mi esperas pri io iom plia.

## 12. Publikigaĵoj pri lingvoj

Por plena listo vidu mian retejon, facile trovebla per Guglado. Inter la menciitaj verkoj mi opinias ke 88-a kaj 95-a estas la plej gravaj el lingvistika vidpunkto; 92-a, 08-a kaj 11-a el historia vidpunkto.

- 88-a. La problemo de duarangaĵ deriviĝoj en Esperanto. **En:** *Akademiaj Studoj 1987*, pp. 65–75. Bailieboro, Canada: Esperanto Press, 1988. ISBN 0-919186-33-5.

- 90-a. Nomoj de matematikaj operacioj en Esperanto. *Serta Gratulatoria in Honorem Juan Régulo*, vol. IV, pp. 683–697. La Laguna: Universidad de La Laguna, 1990.
- 91-a. Vortkreaĵoj de Esperanto. *Scienca Revuo* **42** (1991), 95–109. ISSN 0048-9557.
- 92-a. Kial ni hejtas la hejmon sed ŝajnas fajfi pri la fajlado? *Literatura Foiro* **138** (1992), 213–216.
- 92-b. Studo pri la vorto *dateno*. *Matematiko Translimen* **7** (1992), 41–45. ISBN 2-904752-00-5.
- 93-a. Primitiveco de kelkaj adverboj. *La Letero de l' Akademio de Esperanto* **25** (1993), p. 8. ISSN 0986-1181.
- 95-a. Transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto. **En:** Chrdle, P. (red.), *La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto. Prelegkolekto de la unua simpozio de la Akademio de Esperanto en Prago 1994-07-07–14*, pp. 24–40. Dobřichovice (Prago): Kava-Pech, 1995. (Ĉinlingva traduko aperis en *La Mondo*, 1997: 5–6: 16–17; 1997: 7–8: 22–24; 1997: 9–10: 11–13.)
- 01-a. La sveda faklingvo en tekniko, matematiko kaj natursciencoj. **En:** Fiedler, Sabine; Liu Haitao (red.), *Studoj pri interlingvistiko. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Studien zur Interlinguistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag*, pp. 40–56. Dobřichovice (Prago): Kava-Pech, 2001. ISBN 80-85853-53-1.
- 01-b. Kreado de matematikaj terminoj. **En:** Kiselman, Christer; Mattos, Geraldo (red.), *Lingva Planado kaj Leksikologio. Language Planning and Lexicology*, pp. 173–187. Kontribuajtoj al internacia simpozio, Zagrebo, 2001-07-28—30, 2001. Chapecó, SC: Fonto, 2001.
- 01-c. Svenskt fackspråk inom teknik, matematik och naturvetenskap [Sveda faklingvo en tekniko, matematiko kaj natursciencoj]. *Libens Merito. Festschrift till Stig Strömholm*, pp. 225–243. Acta Academiae Regiae Scientiarum Upsaliensis, volumo 21 (2001).
- 08-a. Esperanto: Its origins and early history [Esperanto: ĝia origino kaj frua historio]. **En:** Andrzej Pelczar (red.), *Prace Komisji Spraw Europejskich PAU*. Volumo II, pp. 39–56. Krakovo: Polska Akademia Umiejętności, 2008, 79 pp.
- 08-b. Kiselman, Christer; Mouwitz, Lars. *Matematiktermer för skolan [Matematikaj terminoj por la lernejo]*. Gotenburgo: Gotenbarga universitato, Nacia centro por matematika edukado, 2008. 312 pp.
- 08-c. Språkens rikedomar och terminologins problem [La riĉoj de la lingvoj kaj la problemoj de la terminologio]. **En:** Kiselman, Christer; Mouwitz, Lars, *Matematiktermer för skolan [Matematikaj terminoj por la lernejo]*, pp. 287–292. Gotenburgo: Gotenbarga universitato, Nacia centro por matematika edukado.
- 11-a. Variantoj de esperanto iniciatitaj de Zamenhof. *Esperantologio / Esperanto Studies* **5**, 79–149. Publikigita elektrone 2011-06-24; surpapere 2011-07-23. Ankaŭ publikigita en *Esperanto, komenco, aktualo kaj estonteco. Aktoj de la 33-a Esperantologia Konferenco en la 95-a Universala Kongreso de Esperanto, Havano 2010*, pp. 45–107. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

### 13. Publikigaĵoj en esperanto ne pri lingvoj

- 89-1. La kultura signifo de la matematiko. *Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj*, N-ro 3/4, oktobro 1989, pp. 44–50 (esperante); pp. 51–55 (ĉine). *Ponteto*, N-ro 119, oktobro 1990, pp. 2–13 (japane kaj esperante). *Fréttabréf Íslenska stærðfræðafélagsins*, junio 1994, pp. 35–44 (islandlingve).
- 92-1. La teoremo de Siu por abstraktaj nombroj de Lelong. **En:** Neergaard, Paul; Kiselman, Christer (red.), *Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius*, vol. 1, pp. 56–65. Beijing, 1992. ISBN 7-5052-0042-9.

- 03-1. La geometrio de la komputila ekrano. **En:** Michela Lipari (red.), *Internacia Kongresa Universitato*, pp. 1–12. Roterdamo: Universala Esperanto Asocio, 2003. 83 pp.
- 07-1. Enkonduko al distribucioj. *Acta Sanmarinensia*, vol. VI (2004), N-ro 4, pp. 105–132. Academiae Internationalis Scientiarum (AIS). Göttingen: Leins Verlag, 2007.
- 12-2. Diskreta kaj reela optimumado. *Prelegaro, Parto II. Internacia Simpozio “Apliko de Esperanto en la profesia agado”*, 2012, pp. 72–84. Karlovo: Akademio Internacia de la Sciencoj. (Teksto bazita sur prelego ĉe AEPA en Karlovo junio de 2009.)

## 14. Aliaj publikigaĵoj iel rilataj al esperanto aŭ aliaj lingvoj

- 81-ii. Några personliga tankar om esperanto [Kelkaj personaj pensoj pri esperanto]. *La Espero*, N-ro 6, 1981, p. 101.
- 82-i. Varför behöver vi ett konstgjort språk? [Kial ni bezonas artefaritan lingvon?] *Skolvärlden*, N-ro 23, 1982-10-01, pp. 6–7.
- 82-ii. Kan man umgås (civiliserat) på en planet med tretusen språk? [Ĉu oni povas umi (civilize) sur planedo kun tri mil lingvoj?] *Universen*, N-ro 8, novembro 1982.
- 83-i. Fråga: Vad är ett världsspråk? [Demando: Kio estas monda lingvo?] *La Espero*, N-ro 2, 1983, pp. 21–22.
- 85-i. Pli ol sciencpopulariga. Recenzo de: Ilona Koutny (red.), *Matematiko, instruado de matematiko kaj komputotekniko: prelegoj de Interkomputo, Budapeŝto 1982*. (Budapest: NJSZT.) *Esperanto*, 1985, oktobro, p. 172.
- 85-ii. Esperanto — världens farligaste språk? [Esperanto — la plej danĝera lingvo de la mondo?] *Upsala Nya Tidning* 1985-12-19. [Origina titolo: Världens farligaste språk måste bekämpas med alla medel [La plej danĝera lingvo de la mondo nepre estu kontraŭbatalata per ĉiuj rimedoj].]
- 86-i. Språk för internationell kultur [Lingvo por internacia kulturo]. *Upsala Nya Tidning* 1986-01-02. [Origina titolo: Esperanto för en internationell kultur! [Esperanto por internacia kulturo!].]
- 86-ii. Framtidens språkutbildning finns redan nu i Bengtsfors [La lingva edukado de la estonteco jam nun ekzistas en Bengtsfors]. *Dalslänningen* 1986-01-21.
- 86-iii. Recenzo de: *Principoj por elekto de matematikaj kaj stokastikaj terminoj en Esperanto* de Olaf Reiersøl (Oslo: Universitato de Oslo, 1985, 40 pp., ISBN 82 553 0583 1). *Esperanto*, 1986, julio-aŭgusto, p. 132.
- 87-i. Antaŭparolo de 86-A (kun komentoj de Ivo Lapenna). *Horizonto* 1987:67, p. 5.
- 89-i. Kulturell mångfald kontra kulturell likriktning [Kultura multifaceteco kontraŭ kultura unuformeco]. **En:** Aira Kankkunen (red.), *Debatt om tvåspråkighet [Debato pri dulingveco]*, pp. 9–12. Gotenburgo: Esperanto-Societo de Gotenburgo. 30 pp.
- 89-ii. Kinesiska vetenskapsakademin planerar grunda internationellt universitet [La Ĉina Akademio de Sciencoj planas fondi internacian universitaton]. **En:** *Universen*, 1989, N-ro 2, p. 5.
- 92-i. Recenzo de: *Enkonduko al problemsolva originala KJ-metodo* de KAWAKITA Jiro. *Esperanto*, januaro 1992, p. 13.
- 92-iii. Ankoraŭ pri komputiloj kaj supersignoj. *La Espero*, N-ro 4/5, 1992, p. 9.
- 95-i. La antaŭiranto de Esperanto. Recenzo de: *Konciza Gramatiko de Volapuko; Gramat breĥk Volapüka* de André Cherpillod (Cougenard 1995, 48 pp.). *Monato*, septembro 1995, p. 23.

- 96-i. Ludoj, sed ne tiuj. Recenzo de: *Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj. Ĉu mi lernu Esperanton?; Einführung in die Theorie sprachlicher Spiele. Soll ich Esperanto lernen?* de Reinhard Selten kaj Jonathan Pool (Berlin kaj Paderborn, 1995, 148 pp.). *Monato*, majo 1996, p. 20.
- 96-ii. Historio de la volapuka movado. Recenzo de: *Historio de la universala lingvo Volapuko* de Johann Schmidt, tradukita de Philippe Combout (Cougenard, 1996, 30 + XXII pp.). *Monato*, aŭgusto 1996, p. 21.
- 98-i. Libereco de kreado estu homa rajto. [Raporto pri konferenco de Unesko]. *Esperanto*, N-ro 5, majo 1998, p. 85.
- 99-i. Eklipso de la suno. *Kontakto*, N-ro 172 (1999:4), p. 9.
- 99-ii. Akademio en Berlino. *La Ondo de Esperanto*, N-ro 10 (1999), p. 5.
- 99-iii. Akademio sin prezentas ankaŭ prelege. *Heroldo de Esperanto*, N-ro 10-11 (1999), p. 2.
- 99-iv. Suna eklipso 1999 08 11. *Fonto* **19**, N-ro 227, novembro 1999, pp. 30–31.
- 01-i. La fondo de Akademio Comenius. **En:** Minnaja, Carlo (red.), *Eseoj memore al Ivo Lapenna*, pp. 101–104. Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna. Kopenhago: www.kehlet.com, 2001. ISBN 87-87089-09-2.
- 01-ii. Simpozio pri lingva planado kaj leksikologio en Zagrebo. *La Ondo de Esperanto*, N-ro 10, 2001, p. 7. Ankaŭ en: *La Hirundo*, N-ro 024, oktobro 2001, p. 6; kaj *Fonto*, N-ro 251, novembro 2001, pp. 30–32.
- 02-ii. El akademiaj babiladoj en la reto [Devus esti: Fundamentaj vortoj en la *Akademia Vortaro*: “Deino volis krei ses sesonojn”, skribis Geraldo Mattos]. *Fonto*, N-ro 260, aŭgusto 2002, p. 34.
- 02-iii. Normer finns för datum [Ekzistas normoj por la skribado de datoj]. Letero al la redaktoro, *Dagens Nyheter* 2002-11-17.
- 02-v. Datering och logisk ordning [Datigo kaj logika ordo]. Letero al la redaktoro, *Dagens Nyheter* 2002-12-14.
- 05-ii. Kiselman, Christer; Halldin, Sven; Danielsson, Ulf; Carlson, Karin; Mattsson, Amalia; Rutberg, Martin. “Svenska språket dör ut på landets universitet” [“La sveda lingvo mortas en la universitatoj de la lando”]. *Dagens Nyheter* 2005-06-17, p. 6. [Origina rubriko: Utbildningens internationalisering och demokratin [La internaciigo de la edukado kaj la demokratio].]
- 05-iii. Mattsson, Amalia; Kiselman, Christer; Carlson, Karin; Rutberg, Martin; Halldin, Sven; Danielsson, Ulf. Utbildningens internationalisering och demokratin [La internaciigo de la edukado kaj la demokratio]. *Quartilen, Svenska statistikersamfundets tidskrift*, vol. 20, N-ro 3, p. 15–16, Septembro 2005.
- 08-ii. Floriga, la prelego plej bela. *Heroldo de Esperanto*, N-ro 10 (2125), 2008 julio 13 – aŭgusto 3, p. 4. [Raporto pri prelego pri Vincent van Gogh farita de Katalin Kováts en Roterdamo 2008-07-22. *Origina titolo*: La plej bela prelego.]
- 09-i. Antaŭparolo. **En:** Corsetti, Renato (red.), *Vojoj de interlingvistiko: de Bruno Migliorini al la nuna tempo. Aktoj de la studtago en la universitato de Florenco, 26a de julio 2006*, pp. 7–8. Akademio de Esperanto. Pizo: Edistudio 2008 [2009]. 127 pp.
- 10-i. Hilelismo, homaranismo kaj neŭtrale-homa religio. **En:** Blanke, Detlev; Lins, Ulrich (red.), *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*, pp. 401–414. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio 2010.
- 10-ii. La evoluo de la pensado de Zamenhof pri religioj kaj la rolo de lingvoj. *Homarane* **1**, januaro 2010, 41–73. ISSN 1663-8484.

- 10-iii. La evoluo de la pensado de Zamenhof pri religioj kaj la rolo de lingvoj. **En:** Kiselman, Christer (red.), *Religiaj kaj filozofiaj ideoj de Zamenhof: kultura kaj socia fono*, pp. 41–63. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 2010.
- 12-ii. Paul Neergaard: sempatologo kaj esperantologo. **En:** Blanke, Detlev (red.), *Pioniroj de la Internacia Lingvo. Aktoj de la 34-a Esperantologia Konferenco en la 96-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago 2011*, pp. 19–33. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. ISBN 978 92 9017 117 1.

## 15. Raportoj kaj lekciaj notoj en esperanto

- 85-A. *Matematika terminaro Esperanto-angla-franca-sveda*. Raporto 1985:14. Upsala universitato, Matematika instituto, 1985. iv + 30 pp. [Nun anstataŭigita de la matematikaj terminoj en NPIV.]
- 86-A. *Konvekseco en kompleksa analitiko unu-dimensia*. Lekciaj notoj 1986:LN2. Upsala universitato, Matematika instituto, 1986. iii + 66 pp.
- 91-B. *Konveksaj aroj kaj funkcioj*. Lekciaj notoj 1991:LN2. Upsala universitato, Matematika instituto, 1991. 35 pp.

## 16. Redaktado lige al lingvoj

- Redaktinto kune kun Paul Neergaard de *Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius*,  
vol. 1 (Beijing) 1987–1992
- Redaktinto de *Matematiko Translimen*, N-ro 7 1992
- Eksperto por la matematikaj terminoj en franc-sveda vortaro: *Fransk-svensk ordbok*,  
XIV + 1007 pp., Stokholmo: Natur och Kultur (1995) 1995
- Redaktinto de *Esperantologio / Esperanto Studies*, kajero 1 1999
- Redaktinto kune kun Geraldo Mattos de *Lingva planado kaj leksikologio: Kontribuajoj al internacia simpozio, Zagrebo, 2001-07-28–30*. Chapecó, SC (Brazilo): Fonto 2001
- Redaktinto de *Esperantologio / Esperanto Studies*, kajero 2 2001
- Redaktinto de *Symposium on Communication Across Cultural Boundaries; Simpozio pri interkultura komunikado, Gotenburgo 2003*. 157 pp. Dobřichovice (Ĉeĥio): Kava-Pech 2005
- Redaktinto de *Esperantologio / Esperanto Studies*, kajero 3 2005
- Redaktinto de *Esperantologio / Esperanto Studies*, kajero 4 2009
- Redaktinto de *Religiaj kaj filozofiaj ideoj de Zamenhof: kultura kaj socia fono. Aktoj de la 32-a Esperantologia Konferenco en la 94-a Universala Kongreso de Esperanto, Bjalistoko 2009*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 2010 2009–2010
- Redaktinto de *Esperantologio / Esperanto Studies*, kajero 5 2010–2011
- Redaktinto de *Esperanto: komenco, aktuala kaj estonteco. Aktoj de la 33-a Esperantologia Konferenco en la 95-a Universala Kongreso de Esperanto, Havano 2010*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio 2011. 2010–2011
- Redaktinto kune kun Mélanie Maradan de *Leksikologio, frazeologio, historio, semantiko kaj terminologio: du kontinentoj renkontiĝas en Hanojo. Aktoj de la 35-a Esperantologia Konferenco en la 97-a Universala Kongreso de Esperanto, Hanojo 2012*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio 2013. 2012–2013
- Redaktinto de *Esperantologio / Esperanto Studies*, kajero 6 2012–2013

*Paperpoŝta adreso:* Upsala universitato, Matematika instituto, Poŝtkesto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedio

*Sukcenaj adresoj:* [kiselman@math.uu.se](mailto:kiselman@math.uu.se), [christer@kiselman.eu](mailto:christer@kiselman.eu)

*Retejo:* [www2.math.uu.se/~kiselman/](http://www2.math.uu.se/~kiselman/)